



# SZENTENDRE

## la urbo de la historio kaj arto

Norde de Budapeŝto, la okcidentorienta fludirekto de Danubo turniĝas suden kaj faras ortangulon. Tiu angulo estas unu el la plej ravaj regionoj de Danubo. La larĝa rivero fluas inter verdaj montoj. Sur la bordoj kasteloj, antikvaj fortikaj-ruinoj kaj modernaj strandoj. Sur la akvo naĝas ŝipoj kun ekskursantoj sur la ferdeko, sonas muziko kaj diŝe remas miloj da boatveturantoj.

En ĉi tiu bela angulo la plej interesa urbeto estas Szentendre (pr: sentendre = Sankta Andreo) kun ne pli ol 10 000 loĝantoj, sed ĝia romantike antikva aspekto meritas apartan pritrakton.

Szentendre situas proksime al Budapeŝto, je 20 km-a distanco kaj estas atingebla per tramo, buso aŭ ŝipo. La urbo estas mem la enŝtoniĝinta historio.

En la dekkvina jarcento, kiam la turkoj okupis Bizantion (1453), grekaj intelektuloj kaj komercistoj fuĝis norden kaj kelkaj el ili ĉi tie fondis kolonieton. Ilia alta kulturo videblas ankaŭ nun sur la stratoj. Krome, ankaŭ sudslavaj rifuĝintoj venis en du ondoj: en 1389, post la granda balkana malvenko kaj en 1690, post la falo de Belgrado. Ĉi tiuj du kulturoj stampis siajn karaktertraĵojn al la urbo, kiu estis tiam vigla komerca centro, ĝis la fino de la 18-a jarcento, kiam la apuda Budapeŝto komencis altiri la fluktuantan negocan vivon de Szentendre kaj tiam la urbo ŝtoniĝis en sia dekokjarcenta aspekto tute ĝis hodiaŭ. La zigzagaj stratetoj elspiras du-tri jarcentan atmosferon, kaj la rokoko-, barokaj empirstilaj domoj nun estas



4200-jara earstatueto en la urba muzeo



Ruinoj de Romia gardoturo de la fortikaĵo



Centra katolika preĝejo el la 13-a jc.

zorge konservataj, netuŝeblaj relikvoj.

Sed la regiono havas multe pli malnovan kulturen pasinton. En la urba muzeo videblas 4200 jara argilstatueto pri kvarrada ĉaro, kiu dokumentas, ke la tiamaj loĝantoj jam konis la radon.

Nome, tie preteriris la ĉefa okcident-orienta karavanvojo, kiu ĝis tie sekvis la linion de la Danub-fluo kaj ĉi tie forlasis ĝin.

La praloĝantoj, antaŭ la romianoj estis la *eraviskoj*, kies kulturon la konkeranta Romia imperio neniiĝis, kaj nur nun, la esplorfosadoj malkovras artajn kaj metiajn objektojn, kiuj paŝo post paŝo konatigas nin pri ilia alta civilizacio. La eraviska nomo de Szentendre estis *Ulcisia* (jam laŭ latinigita formo), kiu signifas eravisklingve: "lupfortikaĵo".

La romianoj ĉi tie konstruis propran, novan fortikaĵon, nomitan *Ulcisia castra* kaj soldat-urbon, kies ruinojn la fosadoj malkovris kaj la publiko povas vidi ĝin.

Post la ĉeso de la Romia imperio ankaŭ la kulturevoluo ĉesis. La sekvinta monumento datiĝas el la 13-a jarcento, kiam la envenintaj hungaroj jam kristaniĝis. Tiam konstruiĝis la ankaŭ nun staranta centra preĝejo sur monteto, inter fortikaj muroj. La preĝejon poste la turka invado ege difektis kaj nur post la regajno de la regiono, en 1710 oni ĝin rekonstruis. Tial ĝi havas romanikajn, gotikajn kaj barokajn stilelementojn, tamen en bona harmonio. Sur ĝia muro ĝis hodiaŭ restis sendifekta la antikva sunhorloĝo.

Do, la urbo estas laŭdestina artistista urbo, ŝatata centro de pentristoj. Tie edukiĝis kaj loĝis *János Jankó* (1833—1896), la plej sprita karikaturisto de sia tempo, *Károly Ferenczy* (pr: Karoj Ferenci, 1862—1917), la fondinto de la hungartipa dekorativa naturalismo. Liaj ĝemelgefiloj fariĝis ankaŭ famaj artistoj kaj vivis en Szentendre: la filino, *Noemi* estis goblenartisto, la filo, *Béni* skulptisto kaj relieffisto. Sed la plej hejma kaj en Szentendre plej konata artisto estis *Tibor Boromisza* (pr: Boromisa, 1880—1960), naturalista impresionista pentristo, kiu pleje

komprenis la hungaran popolan animon. El liaj verkoj, precipe temantaj la popolvivon, la urbo subtenas apartan muzeeton sur la Danuba kajo.

En 1928 fondiĝis la *Societo de Pentristoj en Szentendre* kaj nun la artista kolonio havas apartan, komunan loĝejon, meze de arbareto, kie ili povas vivi por la kreado, kontraŭ tre malalta prezo. El la verkoj de la skulptistoj estas ankaŭ liberaera muzeo, en parko.

Ĉi tie naskiĝis kaj vivis la unua sudslava romanverkisto, *Jakov Ignatoviĉ* (1824—1888).

Krom la menciitaj tri muzeoj troviĝas riĉa muzeo de la grek-orienta religia arto kun pastraj talaroj, kalikoj, kodeksoj, ornamaj biblioj, ikonoj, ktp. el la pasinto.

Sed Szentendre estas ne nur historia kaj arta urbo. Ĝi estas krome unu el la plej ĉarmaj ekskursaj kaj refreŝigaj lokoj. La urbeto havas seshektaran, malgrandan, sed tre ravan insulon, nomitan *Papsziget* (pr: papsiget, pastra insulo). Ĝi estas pranaturparko kun plurjarcentaj arboj kaj abundega herbaro. Nun ĝi estas netuŝebla naturrezervato kun libere vivantaj sciuroj, fazanoj, ktp. Sur la norda insulfino nun estas establita moderna kampadejo kun dormodometoj, strandbanejo kaj ĉiuj komfortaĵoj, inter la oldegaj arboj. Vere refreŝiga paradizo.

Menciinde estas ankoraŭ, ke ĉi tie vivas unika specio de rozo, laŭ scienca nomo: *Rosa Sancti*



*Centra placo*

*Andreuo* = rozo de Sankta Andreo, kiu troviĝas nenie aliloke sur la mondo. Nun vivas jam nur dek arbustoj el ĝi, kiuj estas memkompreneble zorgege flegitaj, por savi ilin de la plena ekstermiĝo.

Krom la kampadejo funkcias por la turistoj en la urbo 80 lita turista hotelo kun restoracio kontraŭ tre modestaj prezoj.

Dum la venontjara Budapeŝta mondkongreso niaj gastoj povos elekti loĝigon ankaŭ ĉi tie kontraŭ tre malalta prezo. Plej agrabla kaj malmultekosta estas la kampado en propra tendoj.



*Tibor Borovicsa:  
Maljuna paŝtisto*

Sándor SZATHMÁRI



*Turista hotelo*



*Insuleto Papsziget*